

N°183
juillet
août
septembre
2018

LA INFORMILO

N° 183
julio
aŭgusto
septembro
2018

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

esperanto
France-Est

ESPERANTO
2018
Justa komunikado

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"




27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 17€

Reta abono: 7,50€



KERNPUNKTO



Une équipe de jeunes espérantophones allemands de l'association **BAVELO** (Association d'espéranto de Bade-Wurtemberg), l'association partenaire d'Espéranto France-Est, ont créé le site <https://kern.punkto.info/> qui informe la diaspora espérantophone de la diversité des compétences professionnelles ou associatives de ses membres.

Eva et Johannes sillonnent le monde et participent à de nombreux congrès nationaux et internationaux ou à d'autres rencontres culturelles qui concentrent des espérantophones de tous pays. Ils y enregistrent des spécialistes espérantophones de domaines très variés (écologie, technique, informatique, diplomatie, art, sociologie, etc...)

Les interviews durent entre une et deux heures et, détail intéressant: le site permet aux espérantophones débutants de régler la vitesse d'élocution du locuteur, ce qui est une aide non négligeable pour des apprenants.

**Une première mondiale:
Des professeurs chinois enseignent l'espéranto à des guides
touristiques en Corée du Nord**




77a Hispana Esperanto-Kongreso 51a Kongreso de ILEI Madrido, 20-28aj de Julio 2018

En la semajno antaŭ UK okazis tute oportune du kongresoj en Madrido, nome la 77a Hispana Esperanto-Kongreso kaj la 51a Kongreso de ILEI

Ili allogis pli ol 250 partoprenantojn el pli ol 30 landoj.

La aranĝoj okazis en la Universitata rezidejo (studento-hejmo) "Kolegio Mayor *Teresa de Jesús* kaj *Diego de Covarrubias*", apartenanta al la komplekso de rezidejoj de la Universitato "Complutense de Madrid". Plej multaj partoprenantoj loĝis en studentaj ĉambroj.

Jam ĉe la alveno necesis al kutimiĝi al specifaj manĝ-horoj en Hispanio, nome tagmanĝo je la 14a kaj vespermanĝo je la 21a. Kaj ankaŭ iel al la manko de akurateco.



En la unua tago (20a de julio) okazis la inaŭguro de la Hispana kongreso kun omaĝo al pluraj hispanaj Esperanto-pioniroj de la lasta jarcento. Prelego de Dennis Keefe montris kiel evoluis la hispana Esperanto-movado ĉefe post la falo de la diktaturo.

En vespera prezentado eblis iom malkovri la urbon Madrido.

Jam en la posta mateno estis proponitaj ekskursoj al Madrido, ĉu "esenca", ĉu "beletra". La ĉiĉerono havis la malfacilan taskon organizi la veturadon al la urbo per urba aŭtobuso. Kvankam tio aspektis iom ĥaosa, ĝi funkciis, kaj ĉiuj povis ĝui la belecon de la urbo kaj ties riĉaĵojn.



Pluraj imponaj konstruaĵoj kaj palacoj montris la riĉecon de la ĉef-urbo de Hispanio.

La LKK-anoj strebis organizi agrablajn tagojn por la partoprenantoj. Tre riĉa estis la oferto pri turisma programo. Ni povis ekkoni ne nur la historion de Madrido, ĝiajn muzeojn, sed ankaŭ admiri ĝiajn ĉirkaŭaĵojn kaj belaĵojn dum tagaj aŭ noktaj promenoj.

Post la alveno sabate la 21-an de julio vespere okazis interkona frandvespero, kie ĉiuj alportis ion tipan por trinki aŭ manĝi el sia lando.



Frاند-vespero estas ŝatata tradicio ĉe ILEI-kongreso. En Hispanio ĝi estis aparte agrabla en la vesperiĝo, kiam la suno jam ne plu estas tiom varma. El Koreio kaj el Ĉinio estis proponitaj multaj allogaj manĝaĵoj.



Poste la ensemblo "Kaj Tiel Plu" animis la vesperon per siaj okcitanaj, sefardaj, trobaduraj kaj katalunaj kantoj, kelkaj el ili kantataj esperantlingve. Alian vesperon la duopo Ankie kaj Nanne el Nederlando ĝojigis la kongresanojn per koncerto kun siaj humuraj kaj etoso-plenaj kantoj.



La ĉeftemo de la kongreso estis: "La kultura heredaĵo de Esperanto". Ĝi estis pritraktata en la enkonduka prelego de la prezidantino de ILEI Mireille Grosjean. La festprelegon "La eduka modelo de UNED" prezentis Manuel Pancorbo Castro.

La programeroj konsistis el prezentado de kelkaj libroj, oni diskutis pri la revuo de ILEI "Juna Amiko". Junuloj havis sian programon, ili amuziĝis ĉefe nokte. Okazis vizito al la Instituto de kultura heredaĵo, promeno tra la scenaro de la batalo de Madrido *¡NO PASARÁN!*



Dum la semajno okazis E-kursoj por komencantoj kaj progresantoj kaj ankaŭ intensa kurso pri la hispana lingvo. Irina Gončarova el Rusio parolis pri siaj spertoj kaj sukcesoj dum la baza E-kurso "Faru la Rondon". Yasuo Tabuchi parolis pri instruado kadre de Oomoto, Duncan Charters pri *Al Ándalus* - araba regado dum la mezepoko de la 711-a ĝis la 1492-a jaroj. Eblis babilo kun Jorge Camacho pri verkado kaj tradukado en Esperanto. Miguel

Gutieres Adúris prezentis la kvaran eldonon de sia vortaro "Amika".

Dum la Nacia vespero prezentiĝis la muzikistoj de la plektr-orkestro *Calle del Barquillo* en kiu kantis la hispana poeto Miguel Fernández.

Jen la tenoro kaj Esperanto-poeto Miguel Fernandes, kiu direktis kaj kantis kun La Plektr-orkestro *Calle del Barquille* ("strato de la vafloj")

Eblis ĝui muzikaĵojn de Mozart, Verdi, Ŝostakoviĉ.

En la internacia vespero, sin prezentis pluraj artistoj. Jen Xose Conde prezentis ĉarman konkresan kronikon, kiu bele resumas la tutan semajnon.

Kongresa kroniko

Ajlala' lara lala lelo
Ajlala' lara lala lelo
Ajlala' lara lala lelo
Ajlalelo ajlala'

Hispana kaj ILEI-kongresoj
Centoj da partoprenantoj
Homoj de kvar kontinentoj
Devenaj el tridek landoj

Amerikanoj, afrikanoj
kaj kelketaj eŭropanoj.
sed multnombra partopreno,
dank' al multaj azianoj

Ĉambroj sen klimatiziloj
dum la hispana somero
Ĉu vi vere povas dormi?
Bonvenon al nokta infero.

Kiel diable konektiĝas
saĝtelefon' al la reto?
Ĉu ne povas esti klare
Tiu estas mia peto:


Je kioma estas la ekskurso?
Demandas samideanoj.
Je la naŭa? Je la deka?
"Kie estas LKK-anoj"?

Kelkfoje biero aŭ kafo
estas vere bezonata.
Kiam oni alvenas tie.
Ho: Trinkejo estas fermita.

Multa bruo, longa vico
dum tagmanĝo kaj vespero
Post duonhora atendo
Vel! Ne estas plu teleroj!

Multaj interesaj prelegoj
Partoprenantoj, bonvenon!
Mi ne povas ja spiri.
Mi bezonas oksigenon

Fremda vespero sabata
Kaj Tiel Plu kantas ĝue
Dum homoj trinkas kaj dancas
falas trinkej-budo brue.



Lingva Festival' dimanĉon
 Homoj, popoloj, kulturoj.
 Bela esperanta propono
 tra la veraj homaj spuroj

Oni bezonas kobajojn
 por la instruada trejnado
 Necesegas tiu afero
 La futuro de l' movado

Mardon jen Kajto koncertas
 Bela muzik' melodia
 Homoj kantas kaj aplaŭdas
 Vera regalo magia

(Ni adiaŭu kunkantante
 Por ke per muzik' lastfoje
 gravediĝu la aer'
 Post nelonge, endormiĝonte
 Ni fordrivu je la eĥo de la
 lastkanto de la vesper')

Se vi iris al Toledo
 malfruo je unu horo.
 Ne estis ĝi sola stultaĵo
 en ĉi tiu urba trezoro.

Ni moviĝis kiel ŝafoj.
 Ne estis tempo por tagmanĝo.
 Kelkaj ne povis rapidi.
 Kia bedaŭrinda aranĝo

Dum ekskurso al Segovio
 perdiĝis kvin partoprenantoj.
 Ĉu eblas tio en eta urbo?
 Demandu al organizantoj

Bele "Vivu la teatro",
 poezio kaj emocio.
 Omaĝe al ĉiuj virinoj
 kontraŭ diskriminacio.

Tre interesa simpozio,
 al ILEI koran dankon.
 Belaj bonegaj prelegoj.
 sed denove aermanko.

Ĵaŭdon vespere Bankedo
 Jen momento dolĉa-amara
 kvardek eŭrojn tio kostis.
 vera prezo "populara"!

Belaj tagoj en Madrido.
 Memoru, esperantistoj:
 la kongreso de ILEI,
 nia ligo de instruistoj.

Ĉu vi iras al Lisbono?
 Ĉu venontjare al Serbio?
 Aŭ ĉu vi revenas hejmen?
 Ĝis revido. Esperantio

Se dum tiu ĉi kroniko
 mi iom ĝenis vian senton
 Pardonpetas mi elkore
 Kvankam mi ne sentas penton.

Dankon pro via aŭskultado,
 karaj gepartoprenantoj.
 Speciale mi dankas
 al ĉiuj organizantoj.



Emocia estis prezento de flamenka danco. Ni ĝuis ankaŭ la spektaklon "Vivu la Teatro"! kun Miguel Fernández.

Dennis Keefe alproksimigis al ni sian revon pri Esperanto-plaĝo. De Lida Elbakjan ni eksciis pri armena kultura heredaĵo. Marija Jerkoviĉ parolis pri Esperantonimoj, Rob Moerbeek pri lingvaj esploraĵoj, Ana Manero prelegis pri avangarda artistino *Maruja Mallo*, Aŭrora Bute pri pioniro de modernismo en la skulptarto *Constantin Brâncuși*. Pri afrika kulturo kaj ties E-movado ni eksciis de Adjévi Adjé. Maritza kaj ŝia filino Ariadna prezentis la kuban kulturon en la E-movado. Ne mankis libroservo, estis instalita fotoekspozicio pri kultura kroata heredaĵo kaj alia pri Esperanto. Ĝuinda estis aŭkcio lerte gvidata de José Antonio del Barrio kaj Katalin Kovats.



Ĉe la fino estis prezentata la venonta kongres-lando Serbio kaj la urbo Ĉaĉak, kie ILEI kongresos de la 13-a ĝis la 20-a de julio 2019. Poste prezentiĝis nova estraro de ILEI kaj fine oni debatis pri kongresaj konkludoj kaj aliaj aktivaĵoj. Dum la Internacia adiaŭa vespero aktoraj niaj talentuloj. Ni ĝuis kantojn, diversajn dancojn, poem-deklamadon, ŝercojn ktp.

Bone disvolviĝis AMO-seminario kaj E-Instruista Trejnado (EIT). Katalin Kovats disdonis diplomojn de KER-ekzamenoj al pluraj personoj. Tre sukcesa estis la Lingva festivalo, kie prezentiĝis trideko da lingvoj. La hispanoj invitis ĉiujn ĉeestantojn al sia venontjara kongreso, kiu okazos komence de majo en Malago kune kun la IFEF-kongreso.

Merkredo estis dediĉita al tuttagaj ekskursoj. Ĉi-foje estis elekto inter Toledo kaj Segovio. Ambaŭ proponoj estis allogaj kaj la partoprenintoj estis kontentaj post la reveno. Duontaga ekskurso celis la urbon Alcalá de Henares, kiu estis deklarita Monda kulturheredaĵo de UNESKO pro sia trajto de unua universitata urbo en la mondo.

Ni ĝuis tre agrablan kongreson dank'al la bona organizado de niaj hispanaj kolegoj, kiuj multe ŝvitis dum tiuj varmegaj tagoj.

Liba Gabalda



Bankedo en la ĵaŭda vespero



En la lastaj du tagoj, ĵaŭde kaj vendrede okazis la Simpozio kun la temo La Kultura Heredaĵo de Esperanto.

Ege interesaj altnivelaj prelegoj troviĝis en la programo de tiuj du tagoj.

En la *Eŭropa jaro de kultura heredaĵo 2018 kaj meze de la internacia jardeko de proksimiĝo de kulturoj 2013-2022*, la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto kaj la 51-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) havas komunan ĉeftemon: La kultura heredaĵo de Esperanto. La Ibera duoninsulo, kiu heredigis multon al la kultura trezoro de la homaro kaj pliriĉigis la kulture heredaĵon de Esperanto, estas ĝusta medio por tia temo kiel ĉefmotivo de ampleksa faka, kleriga kaj kultura programo de la kongreso. Laŭtradicie, ĝi estos specife traktata en la universitata simpozio pri kongresa temo okazanta en la du lastaj labortagoj de la kongreso de ILEI.

Unu el la prelegoj temis pri la retkatalogo de Biblioteko Juan Régulo Pérez de Ana Manero García, Biblioteko Juan Régulo Pérez (Hispana Esperanto-Federacio)

Resumo: Katalogo de biblioteko donas multan informon pri ĝia enhavo, sed ofte tiu ilo ne estas sufiĉe ekspluatata. Scii kiel organiziĝas la diversaj informaj elementoj ene de katalogo kaj kiu rilato estas inter ili konstituas la unuan ŝtupon de kono por bone elturniĝi dum traserĉado. La dua ŝtupo estas koni la funkciadon de la programo kaj ties serĉeblecojn. Por tion studi ni prenos kiel referencon la Bibliotekon Juan Régulo Pérez. Unue, ni konatiĝos kun ties ĉefa retkatalogo, funkcianta per la programo Koha. Poste ni esploros la Bitotekon, ĝian bitan bibliotekon, funkciantan per Dspace. En ambaŭ kazoj temas pri liberaj kaj senpagaj programoj. Per ili Hispana Esperanto-Federacio disponigas siajn bibliotekajn servojn Ŝlosilvortoj: bibliotekoj, retkatalogoj, serĉoj, programoj



Jen parto de la internacia vespero kun skeĉoj, dancoj kaj muziko inkluzive la marĝena kongresa kroniko



esperanto.es/openbiblio/opac

Ĉiuj ĝuis la internacian etoson de tiu semajno kaj la amikan estoson. Ni danku al la organizantoj.

Andreo

Tuttaga ekskurso al Toledo

Estis proponitaj du tuttagaj ekskursoj por merkredo, unu al Segovia kaj alia al Toledo kun starto je la 9a, tamen tiu al Toledo estis prokrastita ĝis la 10a. Post la alveno eblis ĝui de supre la belegan panoramon al la urbo kaj al rivero Taĵo, kiu meandris malsupre. Toledo estas tre riĉa urbo, ĉefe en la katedralo abundas la trezoroj, kun tiom da ornamaĵoj kaj skulptaĵoj. Necesis multe da tempo por ĉion admiri. Eble eĉ tro da tempo, tial pluraj ekskursantoj malkontentis pro la prokrastita tagmanĝo (post 15a30), ĉar ja necesis ankoraŭ viziti la sinagogon.



Toledo estas urbo situanta en la centra ebenaĵo de Hispanio. Toledo estas konata kiel “Imperia Urbo” ĉar ĝi estis ĉefa sidejo de la kortego de Karlo la unua kaj ankaŭ kiel “la urbo de la tri kulturoj”, ĉar ĝi estis loĝata dumlonge de kristanoj, judoj kaj islamanoj. Ĝi situas ĉe la rivero Taĵo je ties dekstra flanko, sur monteto ĉirkaŭ cent metrojn alta super la rivero, kiu ĉirkaŭas ĝin baze, formante rimarkeblan meandron.



La historio de la urbo datiĝas el la Bronzepoko. En 711 Toledo estis facile konkerata de la islamanoj estrataj de Tarik ibn Zijad. La kristana reĝo Alfomso la 6a rekonkeris la urbon en 1085. Dum la Moderna epoko la urbo elstaris kiel sidejo de la Katolikaj Gereĝoj. Post la translokigo de la kortego al Madrido en 1563 la urbo ekdecadenciĝis, ĉefe pro la tiama ekonomia krizo. Jam en nuntempa epoko, Toledo kaj pli precize ties alkazaro iĝis simbolo de la Hispana Enlanda Milito dum la sieĝo de

la alkazaro fare de la respublika flanko. Pri kulturo Toledo ĝuas pro nombraj interesajoj kaj estas Monda heredaĵo de Unesko ekde 1987. Inter tiuj, elstaras la Monaĥejo de Sankta Johano de la Reĝoj, laŭ stilo izabela gotiko de la 15a jarcento, kaj la



Katedralo de Sankta Maria, laŭ gotika stilo de la 13a jarcento. Toledo estis ankaŭ naskiĝloko aŭ loĝejo de famaj artistoj kiaj Garcilaso de la Vega aŭ El Greco inter multaj aliaj.

**Akvo por Kalima (D. R. Kongo)
atingita - planita por 2019**

En Kalima, provinco Maniema, D.R. Kongo, de 80 mil loĝantoj nur 5 mil havis aliron al bona trinkakvo en ilia kvartalo - de minejo el koloniaj tempoj. La aliaj - kutime virinoj - devas marŝi longe al malnova fontano, uzi malbonan akvon au aĉeti multekoste. La urba administracio ne povas investi en akvo-provizon.

Pro tio esperantisto Etienne Katchelewa, inĝeniero pri agrikulturo, petis subteni tion. Enkadre de sia kooperativo PIEADC li ankaŭ planis kaj organizis la laborojn. Pere de 4 projektoj ni provizis akvon por 15 mil enloĝantoj pere de publikaj kranaroj en la centro de kelkaj kvartaloj. Intertempe ni sukcese plenumis kvar paŝojn:

1. 2013, per 3 mil Eŭroj: malsanulejo kaj ĉ. 100 familioj.
2. 2015, per 10 mil Eŭroj: du kranaroj por ĉ. 3000 homoj.
3. 2016, per 11 mil Eŭroj: du kranaroj por ĉ. 6000 homoj.
4. 2018, per 10 mil Eŭroj: du kranaroj por ĉ. 5000 homoj

Ni dankas al la jenaj subtenantoj (en Eŭro):
22 mil de WKV AG, Gutach, Germanio 4 mil de Stichting for Internationale Kommunikatie (Ans kaj Hans Bakker), Nederlando 2 mil de Stiftung Brücke, Germanio 7,5 mil de pluraj kolektoj inter esperantistoj.

Koran dankon al ĉiuj subtenantoj!

Ĝis tiam la akvo venis de la fonto Omari Chami, je la piedoj de la Abuki-montaro. Ĝi estas filtrata per sablo-tavolo, kaj disinfektita pere de kloro. Surlokaj libervoluloj faris la manlaborojn kiel fosi por la tuboj kaj transporti; ili ricevis manĝaĵon kaj salajreton. Du el la kranaroj portas la nomojn de Ans kaj Hans Bakker, grandaj subtenantoj de Esperanto en Afriko.

La estonta projekto 2019:

Por provizi la aliajn 60.000 homojn en Kalima per bona trinkakvo necesas preni akvon el montara rivereto Abuki 300 m super la urbo en distanco de 4 km. La kostoj entute: 37.800 Eŭroj. Ni povas ricevi subtenon de fonduso de la germana ministerio pri evolua kunlaboro ĝis 25 mil), ni esperas de iu firmao 9,5 mil kaj de niaj samideanoj 3,3 mil.

Por subteni Akvo por Kalima, bonvolu donaci aŭ al la UEA-konto de AVE: avex-z, aŭ al germana asocio kiu kunlaboras ĉi-cele – kaj donas donac-kvitancon (ni ĵus kontrolas, ĉu tia validas ankaŭ en aliaj EU-landoj) :

Direkthilfe für Kleinprojekte e. V., Flaunserstr. 1, DE-79102 Freiburg, Konto: Volksbank Freiburg IBAN: DE58 6809 0000 0009 4430 02, BIC: GENODE61FR1

Projekt-Adreso (en la franca aŭ en Esperanto):
PIEADC, c/o Etienne Katchelewa Kandolo,
pieadc2006@yahoo.fr,
www.kamparanasolidareco.weebly.com

Pliaj informoj ĉe Asocio de Verduloj Esperantistaj:

verduloj.org/afriko.htm

Se vi havas demandojn bonvolu skribi al:
D-ro Manfred Westermayer (AVE, Eo-Friburgo)
Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen, e-mail:
manfred@westermayer.de, Tel. +49-761-584854
UEA-Konto de AVE: avex-z

Fotoj



2017 Krano-duopo Manfred Volk



2016 Krano-kvaropo Hans Bakker
de la 3-a projekto

Karaj gesamideanoj,



Permesu, ke mi citu personan sperton por priskribi situaciojn de komuniko-problemoj, kiuj certe malpli gravus, se Esperanto vaste rolus kiel internacia komunikilo!

Mi pasigis kelkajn tagojn en Ĉeĥio, apud Prago, kun mia edzino. La ĉeĥan ni ambaŭ ne parolas. Konante la historion de la regiono, ni alparolis la homojn komence en la germana – kvankam la nazia periodo ne postlasis eksterordinaran ŝaton de la lingvo. Sed ni renkontis kaj gejunulojn, kaj malpli junajn homojn, kiuj sufiĉe bone ĝin parolis, sed la plejmulto nur ĝin balbutis. Pro tio la certeco pri vera kompreno ne oftis.

En Prago mem ni rapide rezignis kaj alparolis la homojn en la angla. Plej ofte la respondo ja venis en la angla, sed ankaŭ tie ni rimarkis, ke la respondo estis ege supraĵa kaj ofte nekomprenbla. Ni “testis” la policistojn kaj la ĉegiĉetajn fervojistojn: juna policisto flue nin informis, dum malpli juna tute ne konis alian lingvon. En la ĉefstacidomo, en banko kaj en muzeoj la komunikado per la angla sufiĉe bone funkciis, sed en la kamparo kvazaŭ neniu inter tiuj ŝtadungitoj parolis nek la germanan, nek la anglan, nek la francan. Mi tamen reliefigu, ke ĉiuj ege afable reagis por helpi nin.

Feliĉe la amasegoj da turistoj, kiuj invadas la plej vizitatajn kvartalojn de Prago estas akompanataj de ĉiĉeronoj! Ni alvenis al la jena konkludo: kia manko de kontakto kun la loĝantoj de la vizitata lando por la multnombraj ĉinoj, japanoj kaj hispanoj – aŭ latin-amerikanoj! La hispana lingvo surprize aŭdiĝis ege ofte, dum la franca kvazaŭ malekzistis!

E. L.

La dankema merlino

Ĉarma rakonto verkita de la Esperanto-klubo de Nancy

Iun printempan tagon mi estis en mia domo, kiam mi aŭdis laŭtan pepadon de merlino el mia ĝardeneto. Mi alproksimiĝis al la malfermita fenestro kaj vidis katon, kiu lude turmentis iun besteton, eble birdon.

Mi tuj eliris en la ĝardenon por ĝin liberigi el la danĝeraj ungoj de la kato. Vidante min, la kato tuj forsaviĝis kaj samtempe liberigis timantan merlidon. Mi prenis la kompatindan birdeton en miajn manojn kaj, karesante ĝian silkecan plumaron, kunportis ĝin en mian loĝejon. Mi donis al ĝi iomete da akvo kaj post kelkaj minutoj de kvietigaj paroloj kaj karesoj mi enmetis la nun tranviligitan merlidon en malnovan delonge malplenan birdokaĝon. Ĉar la birdeto ankoraŭ ne kapablis flugi, mi ne fermis la pordon de la kaĝo, kiun mi lokis sur la fenestrobreton.

Post iomete da tempo mi denove aŭdis laŭtegan pepadon de la patrino. Ree mi eliris en la ĝardenon kaj atente ĉirkaŭrigardis la lokon sub la arbo. Ho! Tiam mi trovis unu..., poste du..., kaj tri aliajn merlidojn, kiuj versajne ĵus falis el la nesto. Same kiel la unuan fojon mi komplete akceptis kaj arigis ilin en la kaĝo, kune kun la una birdeto.

Fine de la posttagmezo, mi vidis neatenditaĵon: jen la merlino, kiu kantante alproksimiĝis al la kaĝo. Ĝi restis nur iomete apud ĝia idaro kaj denove rapide forflugis. Sed post momenteto ĝi jam revenis kaj ĉi-foje eniris en la kaĝon por beknutri la karajn birdidojn.


Mi estis tute mirigita! Ĝi tiel plurfoje foriris kaj revenis por alporti la bezonatan nutraĵon al ĉiuj idoj siaj. Tiu iro-reiro daŭris dum pluraj tagoj.

Iuvespere mi rimarkis, ke unu merlido emis elpaŝi el la kaĝo. Tiam mi mankaptis ĝin por instrui al ĝi la flugadon. Mi saltetigis ĝin en miaj manoj kaj tiel ĝi lernis la malfermon de siaj flugiloj. Post kelkaj tiaj ekzercoj la birdeto sukcesis eĉ flugeti. Poste la ceteraj idoj sekvis la saman instruadon mian.

Kaj finfine, iun matenon, ĉiuj merlidoj postflugis sian patrinon aeren. Frue en la vespero la tuta birdfamilio albranĉiĝis sur la arbo antaŭ mia fenestro kaj kantis merlan koncerton.

Tiu afabla dankado multe kortuŝis min.

Gisèle

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	Nova 09.86.38.78.61	andreo.ag15@sfr.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj <i>Assesseeurs</i>	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Michel Basso	03.89.80.86.12	clbm@orange.fr
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net
	S-ro Yves STUTZ	03.89.39.83.14	stutzyses@gmail.com
	S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammach@gmail.com

Abono al La Informilo →	17 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Per internacia ĝiro →	IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY		
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Kern.Punkto	15. Semajno en Les Issambres	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p>
2. ILEI-kongreso Madrido	16. IFEF-kongreso Andaluzio	
3. ILEI-kongreso Madrido	17. Enigmoj kaj anekdotoj	
4. ILEI-kongreso Madrido	18. Poezio + libro Teo kaj Amo	
5. ILEI-kongreso Madrido	19. Abonoj kaj kotizoj	
6. ILEI-kongreso Madrido	20. Itala Kongreso	
7. Ekskurso al Toledo	21. Strasburgo + Fontenoy	
8. Kalima en Afriko	22. UK en Lisbono	
9. Angulo de la prezidanto	23. UK en Lisbono	
10. Komitatanoj kaj enhavo	24. UK en Lisbono	
11. Avula Angulo	25. Esperanto en Norda Koreio	
12. Saketo da nuksoj + UK	26. Esperanto en Norda Koreio	
13. Pri UK + retejo EFE-historio	27. Esperanto en Norda Koreio	
14. Staĝo en Heidelberg	28. Foto-paĝo Itala kongreso	



Dum koŝmarigis la mondmilito, nia regiono (Alzaco kaj départemento Moselle) estis aneksita al la nazia "Reich" ĝis sia Liberigado en 1944-45. Perforto gvtatis ĉiun unuopulon, sed ... maltrafis kelkfoje. En 1940, alvenis "kolonianoj" el Sarlando en mian vilaĝon.

KORA FURIOZECO en 1944

Inter la "Siedler", kolonianoj el Sarlando, sin konigis S-ro Kehrmann, fanatikulo de la nazi-partio. Li surprenis farmon en nia najbareco. La bienon li mastrumis kiel obeinta majstro ordonante ĉiam per ampleksa voĉo la serbajn milit-kaptitojn kaj la ukrainan servistinon. La laboro en la kamparo kaj en lia bestejo glate okazis.

Liaj "Ardennaj" ĉevaloj estis en bona stato kaj fierigis sian posedanton; lia bovinaro estis produkto-plena.

S-ro Kehrmann videble aprecis siajn novajn vivkondiĉojn. Li manĝis ĝissate post suferiga nutraĵ-limigo en sia lando. Lia ventrodikeco pruvis, ke mankis malmulto en lia telero: lakto, butero, lardo, ŝinko, ovoj, kokineto, ... ĉio laŭvole. Kiel koloniano en Loreno, li havis dezirindan situacion kompare kun la popolaro en Germanio. Li vivis "Wie Gott in Frankreich!": kiel Dio en Francio, vortumas popola diraĵo. Li montris sin fervorulo de la reĝimo.

S-ro Kehrmann publike afiŝis sian fierecon kiam la "Wehrmacht" – germana armeo – sukcesis. Li ĉagrene suferis pro militaj malsukcesoj, sed klarvide. En 1944, post la Elŝipiĝo en Normandio, li forlasis sian postenon. Dumnokte li reveturis hejmen kun du ŝarĝitaj farmĉaroj. "Veninte kun valizo, li returnis. . .". Kaj la duan nokton post lia foriro, lia eksfarmo ekflagris kaj la najbara domo ankaŭ detruigis incendie.

Kiam scivolemuloj tiun matenon ariĝis por observi kaj komenti la ruiniĝon, neatendite S-ro Kehrmann aperis. Kun rideto. La vilaĝanoj komprenis, ke li estis la kulpulo de la abomeno.

La disfalo de nazi-revo kondukis S-ron Kehrmann al krimo. Detruante kun kor-furiozo, li elektis bru-atencon. Li decidis puni la mondon, kiu kontraŭstaris la politikan projekton de sia engaĝiĝo.

En la lastaj fumoj de la domtraboj, la lorenaj spektantoj finfine perceptis konfesion de la nazi-diktatura fiasko.

Antaŭ kvindek jaroj, "Majo 68" embuske surfalis la landon. Pro propra kaj muta perforto la enloĝantoj surpriziĝis. Kio reliefigindas?

SURSTRATA FURIOZECO en 1968

La neracia elano de "Majo 68", manifestiĝis ekstravagance:

miaj gelernantoj ne plu lernejen venis. Neatendite: la instruistoj, kiuj neniam strikis, tiam forlasis sian laboron: "Ni faru kiel la amaso!". Bizare: laboristoj ekstrikis sen ia ajn invito de sindikatoj.

Timigante: kiam vi iris al la poŝto por vin provizi per mono, la giĉetistino gentile informis: "Mi bedaŭras, sed via konto ne estas alirebla!". "Strange, allasis abelbredisto, miaj abeloj frenezigaĉas ĉijare.". Freneziga vento blovis sur la tuta lando.

Generalo De Gaulle – Respublika prezidento – renaskigis vorton delonge forgesitan: "chienlit" t.e. tohuvaĉo. Estis revolucio kun batoj kaj parol-liberigo, kiuj ŝokis. Afiŝoj akompanis la kontraŭstarojn en la stratoj, ekzemple: "utopistoj ekstaru!" kaj "nigre kaskita policano vin gvatas".

Sloganoj kiel "Familioj, mi hatas vin "aŭ "Malpermesatas malpermesi "stampis liberecajn postulojn.

Kvindek jarojn poste, kion postlasis tiu bruaĉo?

Historiista resumo tielas:

"Majo 68 dejetis la kristanan fonon, kaj ankaŭ la komunisman regadon."



De tiam socio pretis akcepti aborton, samseksadon, neprecan primokon kaj urĝecon ĝuadi. La virinoj gajnis survoje de egaleco.

Tamen "Majo 68" fiaskis en la kampo de salajra gegaleco!

De tiam la sveno de moralaj gvidsignoj ŝrumpis sociajn valorojn. Ŝveliĝis ĉies postuloj.

luj baraktas anstataŭigi sian vakuon de vivsenco per krueleco kaj fanatikismo. La surmerkato de pornografio banalis kaj malnobligis amaron.

Damaĝe al la junularo.

Feliĉe postrestas sekretaj fundaĵoj, kiuj nutras sindonemon kaj sinoferon. Kiam civitano heroe agas, la tuta lando senspire ĉeestas kaj kore aprobas.

Spirita fibro ne rompiĝis pro iama surstrat-furiozeco.

(el "Ekfloru Toleremo!")

Saketo da nuksoj

de Catherine Hel



Ĉi tiun travivaĵon mi klare memoras ankoraŭ hodiaŭ. Tio okazis en la jaro 1969.

Kiam mi alvenis en la korton antaŭ la domo de la pastro, por ricevi la ĉiusemajnan lecionon de katekismo, jam ĉeestis almenaŭ deko da geknaboj dividitaj en du grupetoj. Estis la ariĝo da knaboj, kiuj fanfarone provis elmontri kun batalkrioj plej grandajn forton kaj lertecon; kaj apude estis tiu da knabinoj, kiuj ŝajnis komploti tiom per la manoj, kiom per la buŝo, ofte ĵetante la okulojn en la direkton de la enirpordo de la pastrejo.

Ĉe la enirpordo staris nekonata, verŝajne dek-aŭ dekunujara –kiel ni– knabino. Ŝi rigardadis alterne la du grupojn kun ĝenata rideto kaj duonplena saketo en la mano. Ŝiaj vestaĵoj estis nekutime plenkoloro buntaj, kaj ŝi kune surhavis pantalonon kaj jupon. Tian vestmanieron mi ankoraŭ neniam vidis antaŭe. Kiu do ŝi estis? Scivoleme mi tuj aliris al la dua grupeto kolekti informojn, sed bedaŭre la novulinon neniu konis.

Poste ŝi fikse rigardis nin, la knabinaron, kaj tiam ŝin ni reciproke rigardadis. Eble tiu perokula interkomunikaĵo trankviligis ŝin pri nia naturo, ĉar tujsekve la knabino alproksimiĝis al ni kun brako etendita por proponi la enhavon de la saketo. Estis sekvinberoj miksitaj kun ĉiaspecaj nuksoj, grajnoj,

el kiuj pluraj estis por ni tute ne konataj, kiel ekzemple tiuj verdaj kun la ŝelo duonmalfermita, aŭ tiuj en formo de komo. Eĉ la aveloj estis ege pli dikaj ol niaj. Ni ĝoje akceptis la donaceton, kaj malkovrante detale ĝin, eligis ekkrietojn de surprizo kaj plezuro. Reznante la neefikajn akrobataĵojn, ankaŭ la knaboj aliris nin por gustumi la sekajn fruktojn. La saketo rapide malpleniĝis, kaj ĉi-momente ni demandis ŝin pri ŝia nomo. Sed malfeliĉe la knabino kapskue respondis nur per kelkaj vortoj tute nekompreneblaj por ni.

Antaŭ ol komenci la lecionon de katekismo, ni do pridemandis la pastron pri la knabino. Li klarigis al ni, ke ŝi venis kun siaj gepatroj el Turkujo, por vivi en Francujo, ĉar en sia lando ili ne estis feliĉaj. Parencoj jam loĝantaj en Parizo atendis ilin, sed antaŭ ol atingi la ĉefurbon, ili iom ripozas en la pastrejo. Ni demandis lin ankaŭ pri ŝia dio, ĉu tiu de turkoj estis la sama, kiel nia. Li respondis, ke ekzistas nur ununura Dio, sed laŭ la religio Li nomiĝas malsame.

Mi estis kontenta, ke la knabino kaj ŝiaj gepatroj trovas helpon en mia lando, sed ŝia baldaŭa foriro al Parizo tamen ĉagrenis min, ĉar jam tiam tre plaĉis al mi renkonti novan amikindon, des pli se tiu venis, kiel ŝi, el tre malproksima lando.

Catherine Hel

Ginette rakontas pri siaj spertoj dum la kongreso en Lisbono

Unue mi konstatis ke la kongresejo estas giganta konstruaĵo (fakultato de juro) en kiu oni devas multe marŝi, grimpi, malgrimpi ŝtuparojn por iri de unu loko al la alia. Tio aldoniĝas al ŝtuparoj en metroo. Por ĉeesti la kongreson, oni devas esti sportema, vigla kaj en bona sano.

La enirejo kaj la apudaj koridoroj estas tre bruaj, sed venis 1500 personoj, kiel havi silenton?

Tamen, kun iom da sperto, oni malkovras lokojn pli kvietajn kaj pli freŝajn, (ni ankaŭ devas eviti la varmegon, ekstere pli ol 40 °). Foje mi ĉeestas du sinsekvajn prelegojn en la sama salono por ne devi marŝi. Ĝenerale mi ne bedaŭras, ĉar ĉio estas bonkvalita, kaj elekti hazarde alportas foje bonajn surprizojn.

Manĝejon malmulte kosten oni povas atingi en la

suban parton de la kongresejo, oni eĉ povas manĝi ekstere apude en tre simpatia ombra korto, tamen foje mi piknikis sur benko en koridoro por eviti tro longan atendo-vicon.

La prelegoj estis altnivelaj. Same la koncertoj, tiu de Jomo finiĝis per danco de ĉiuj sur la podio en entuziasma etoso. La koncerto de la koreanoj Maju estis iom doloriga por la oreloj pro la speciala loka fluto, sed tre originala, kaj foje la projekcioj sur ekrano, kiuj akompanis la muzikon, estis vere geniaj.

Du aferojn mi bedaŭras kaj unu afero ĝojigis min.

Mi bedaŭras ke la ne-esperantistoj ne estis invititaj al kelkaj niaj aranĝoj. Eĉ la esperantistoj devis montri ŝildon kaj foje plie atendi bileton por eniri fest-salonon. La gardistoj estis tre atentemaj.

Mi ankaŭ bedaŭras ke ni ne havis paperajn

lecionetojn de Esperanto en la portugala lingvo por disdoni en hoteloj, restoracioj aŭ en metroo, kiam ni povis kontakti ne-esperantistojn. Mia propra malbona nivelo en la angle ĉagrenis min, sed ankaŭ la manko de kompreno ĉe la portugaloj. Kiam ili konstatas, ke ni balbutas en la angla, ili tuj rifuzas aŭskulti kaj petas helpon de franclingvano. Mi ne povis fari iajn provojn nek progresi en la angla.

Mia granda ĝojo estas, ke multaj junuloj ĉeestis, eĉ pli ol kutime. Eble pro la fakto ke la IJK estis sinsekva kaj proksima, pluraj homoj partoprenis en ambaŭ kongresoj. Plie mi dormis en junul-gastejo (kun Simone Cajelot, kaj agrablaj italino kaj meksikanino). Ni bone

fratiniĝis.

Reveninte, mi ofte pensas pri la bonaj tagoj, pri la merkreda ekskurso sur boato, mi legas la 4 aĉetitajn librojn kaj la donitajn dokumentojn, faras faldadon de papero laŭ la modeloj lernitaj dum origamio-lecionoj, provas retrovi la movojn konsilatajn por aikido, kaj kun retroplezuro rigardas miajn fotojn kaj dumkongresajn notojn.

Por resumigi, mi trovis la kongreson tre interesa, bonetosa kaj dinamika.

Ginette

Aktualigo de nia retejo pri la historio de EFE.

Dank'al tiu retejo eblas konsulti historiajn eventojn de nia federacio. Fakte temas pri konsulto de malnovaj numeroj de La Informilo. Ĝis la jaro 2001 la numeroj de la Informilo estis retajpitaj fare de Catherine Roux kun helpo de Ginette. Ili konsistas multajn retpaĝojn (htm) de la tuta retejo.

Ekde 2002 la unuopaj numeroj estas skanitaj al pdf-dokumentoj. Tiun laboron faris Jacques Herlé kaj finfine li sukcese atingi la jaron 2013. Ni gratulu al li pro tiu atingo.

Ekde de 2014 la elŝuteblaj numeroj estas la koncernaj pdf-versioj senditaj al ret-abonantoj. Tial jam ne necesas skani la paperan version.

En la menuo de nia retejo <http://esperanto.france.est.free.fr>

necesas alklaki la linion "Histoire d'Espéranto Fance-Est". Poste alklaku "Historio".

Poste eblas elekti la jaron aŭ serion de jaroj.

La ĉi-suba tabelo montras kiel eblas elŝuti la numerojn de la jaroj 2002 ĝis 2013

Por pli rapide atingi tiun retejon, eblas malfermi: <http://esperanto.france.est.free.fr/historio.htm>

Historio Espéranto-France Est



Historio

EFE dankis

Prezidantoj

La servoj

Elŝutado

Fotoj

1950 1960 1970 1980 1990 2000 2001 2002 ĝis 2013 2014 ĝis 2025

Jaroj 2002 ĝis 2013

Ekde la jaro 2002 la numeroj de la Informiloj estas skanitaj al formato pdf.

Jacques Herlé prizorgis la skanadon de la unuopaj numeroj.

Li jam sukcese atingis la jaron 2013, tial ĉiuj numeroj estas elŝuteblaj per simpla alklako.

Jaroj >	2002	2003	2004	2005	2006	2007	2008	2009	2010	2011	2012	2013
<u>Unua trimestro:</u>	n°117	n°121	n°125	n°129	n°133	n°137	n°141	n°145	n°149	n°153	n°157	n°161
<u>Dua trimestro:</u>	n°118	n°122	n°126	n°130	n°134	n°138	n°142	n°146	n°150	n°154	n°158	n°162
<u>Tria trimestro:</u>	n°119	n°123	n°127	n°131	n°135	n°139	n°143	n°147	n°151	n°155	n°159	n°163
<u>Kvara trimestro:</u>	n°120	n°124	n°128	n°132	n°136	n°140	n°144	n°148	n°152	n°156	n°160	n°164

**Kursoj:**

- A1** komencantoj 1 (Barbara Bertrand)
- A2** komencantoj 2 (Gerold Busch)
- P** paroliga (Edmilson Lima Serejo)
- B** Bukedo kun diversaj prelego-
"floroj" de pluraj prelegantoj (detaloj en la supra teksto)
- i** Infanprizorgado por infanoj (2-10-jaraj) (C. Majer, S.+F. Vogler)

En Hajdelberg' mi perdis mian koron ... estas konata germana studenta kanto.

Pri Heidelberg ne necesas multe diri, jam ĉiuj konas sian famon: la universitaton (plej malnova en Germanio), la kastelon detruitan de la "suna reĝo", la plej grandan vin-barelon de la mondo (bedaŭrinde malplenan), la faman malnovan ponton trans rivero Neckar ... Kelkajn el tiuj vidindaĵoj ni povos mem spekti dum la sabat-posttagmeza ekskurso.

En la seminario vi povas elekti inter la klasikaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj. La bukeda kurso prezentas diversajn interesajn temojn:

- ◆ Kiel plibonigi la komunikadon inter malbon-aŭdantoj kaj bon-aŭdantoj? (Alois Eder)
- ◆ Ruslando estas nia najbarlando (Ulrich Brandenburg, emerita ambasadoro de Germanio en Ruslando kaj nun prezidanto de Germana Esperanto-Asocio)
- ◆ Germanaj specialistoj en Sovetunio – sekve de la milito (Karl Breuninger).
- ◆ La Demokrata Respubliko Kongo plej riĉa kaj plej malriĉa ŝtato de Afriko – kiel ni rilatas al tiu dilemo (Manfred Westermayer, Alois Eder).

**Kostoj:**

Kotizo: 30 € (por junuloj sub-30-jaraĝaj: 15 €).

Restado en la junulargastejo, kompleta pensio por 2 tagoj:
en 4-lita ĉambro 95 € en 2-lita ĉambro 120 €

Aliĝilon bonvolu sendi al: inge.simon@esperanto.de

aŭ poŝte al S-ino Inge SIMON, Brünner Str. 20 DE-73431AALEN

Pagebla per ĝiro al CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy

per franca ĉeko al Esperanto France-Est sendata al André GROSSMANN
5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

ret-adreso: andreo.ag15@sfr.fr

Programskemo**vendredo, 12a oktobro**

17:00 - 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj

18:00 - 19:00 bonvenigo kaj vespermanĝo

19:00 - 20:00 kurso – parto 1

ekde 20:15 amuza programo kun Christoph Frank poste knajpo

sabato, 13a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo

09:00 - 11:45 kursoj de ĉiuj niveloj

12:00 - 13:00 tagmanĝo

14:00 - 17:00 ekskurso por ĉiuj: urbo- esplorado

18:00 - 19:00 vespermanĝo

19:00 - 20:15 kurso

ekde 20:30 amuza programo kun Christoph Frank poste knajpo

dimanĉo, 14a oktobro

07:30 - 08:30 matenmanĝo

08:30 - 09:00 redono de ĉambroj

09:30 - 11:30 kursoj

12:00 - 13:30 tagmanĝo, adiaŭo kaj poste eblas komune ekskursi al la loka Hajdelberga monto Königsstuhl kun elstara rond-rigardo.

Aliĝilo

Mi ĝiras _____ eŭrojn al BAVELO-Konto

IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22 - BIC: SOLADES1VSS .

aŭ al CCP Esperanto France-Est 1997 72 W Nancy

Mi partoprenas ...

la kurson A1 / A2 / P / B / i .

Mi volas dormi en ...

2-lita ĉambro ve/sa sa/di

4-lita ĉambro ve/sa sa/di

Mi serĉas pli komfortan tranoktadon kaj petas helpajn informojn pri tio.

Manĝoj en la junulargastejo:

vendredo sabato dimanĉo

matenmanĝo

tagmanĝo

vespermanĝo

Mi volas vegetarajn manĝojn

Mi volas veganajn manĝojn

Mi havas alergion kontraŭ _____

Nomo, adreso, tel.n-ro kaj retadreso,

DJH Jugendherberge Heidelberg International



Tiergartenstraße 5, 69120 Heidelberg
(Koordinatoj: 49.416039 N, 8.659631 E)
Tel: +49 (0) 6221 651190
jugendherberge-heidelberg.de

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO

2019

Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

2an - 9an de marto 2019

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ:

- **Christine Graissaguel**, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progrès, FR 83600 Fréjus
kris_grai@hotmail.fr - tel. 0033 (0) 4 94 95 66 18

ALIĜILO AL M.E.S. 2019

MEDITERANEA ESPERANTA SEMAJNO - SAINT-RAPHAËL - FRANCIO

NOMO de la 1a partoprenanto:

Naskiĝdato.....

NOMO de la 2a partoprenanto:

Naskiĝdato.....

NOMO de la 3a partoprenanto:

Naskiĝdato.....

Adreso:

Tel.: Retadreso:

► Mi partoprenos de la 2a ĝis la 9a de Marto 2019: jes ne

Sendu al Christine Graissaguel (vidu adreson ĉi-supre)

ĜENERALAJ INFORMOJ

Alveno: De la stacidomo St Raphaël: aŭ per **buso n° 7601 al Saint-Tropez** ĝis haltejo **Le Val d'Esquière Les Issambres**, aŭ per takσιο.

Akcepto: sabaton la 2an de Marto - 15:00 - **Fermo:** sabaton la 9an de Marto - 14:00 (post la tagmanĝo).

Kurs-horaroj: 9:00-12:00 kaj 18:00-19:00

Partopreno en kursoj (3-nivelaj): Elektu vian deziratan kurson en la ĉi-suba tabelo.

Nomo/persona nomo	Kursniveleoj	Kursgvidantoj	Niveleoj
	1	Christine GRAISSAGUEL	Vera komencanto
	2A	Katerina ARBEKOVA	Komenc-parolanto
	2B	Michel DECHY	Progres-parolanto
	3	Fabrizio A. PENNACCHIETTI	Diskuto/analizo

Liberaj posttagmezoj por: bankuracado en proksima marakva banejo (800m), vizitado de Fréjus (klostro), Saint-Raphaël (muzeo), Nico, Menton, Maures-monteto (mimozo kaj piedekskursado), Saint-Tropez, Sainte-Maxime, Bormes-les-Mimosas, bazaro en Ventimiglia (Italio, nur vendrede), ktp.

Ne forgesu viajn marŝo-ŝuojn por piedekskursi sur montetaro.

Distraj vesperoj far la hotelo, Esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... Kunportu viajn amuzajn kanzonojn, ludojn, ktp. **Eblas** bankuracadi en proksima mar-akvo-terapiejo.

ALIĜKOTIZO (ne repagebla) :

- Plenkreskulo: 60 € Paro: 100 €
- Kompleta semajna restado (plenkreskulo) x 360 €
- Suplemento por unulita ĉambro: x 110 € =
- Popersona suplemento por ĉambro almara: x 42 € =

Kurso-nivelo

Mi partoprenos la kursaron: 1 2A 2B 3

Mi volas mem partopreni en programo per:

ALVENO

Trajne (St Raphaël) Fluge (Nico)

Memveture je la horo:

RESUMPAGO


Aliĝkotizo €
Restado €
Tuta Sumo €

Sumo pagebla:

- **per ĉeko** je la nomo de "Esperanto club St Raphaël», sendota kun aliĝilo al:
Christine Graissaguel, Les Iles d'or A, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus, Francio)

- aŭ **per bankoĝiro** al:

Société Marseillaise de Crédit IBAN: FR76
3007 7049 3926 6980 0020 041 BIC:
SMCTFR2A ESPERANTO-CLUB- 83700 ST
RAPHAEL



**71-a Internacia Fervojista
ESPERANTO-KONGRESO**
03-a ĝis 09-a de majo 2019
MALAGO (HISPANIO)

ALIGILO

por la **71-a kongreso de IFEF**
03-a ĝis 09-a de majo 2019

Malago, Hispanio

ĉiu partoprenanto bonvolu pleniĝi kaj
sendi apartan aligilon al retadreso:
ifef2019@esperanto-andalucia.info
marilo1950@hotmail.es

LKK-adreso:

Andaluzia Esperanto Unuiĝo
strato Ánfora, 6-5° D, 29013-Malago (Hispanio)
Kongresa ret-paĝo: <https://esperanto-andalucia.info>

Persona nomo		Persona nomo	
Familia nomo		Familia nomo	
Adreso		Adreso	
Telefona:		Ret-adreso:	
IFEF-ano jes ne		viro virino (forigu ne taŭgajn)	
Mi antaŭpagas jenan sumon :		Eŭro	
Per: ĝiro IBAN: ES57 2038 9814 83 6000595212 SWIFT/BIC: CAHMESMM		Kongreskotizo en Eŭro	
		Ĝis 31.12.2018	Poste Sumo
IFEF-membro		60	80
IFEF-membro loĝanta en B-landoj, laŭ UEA-difino		30	40
Familiano: junulo ĝis 30 jaroj			
Ne IFEF-membro		80	100
Familiano de ne IFEF-membro		40	50
Ĉambro-perado po persono		5	5
V1: Urbovizitado – Malago (piedire)		3	3
V2: Urbovizitado – Malago, Botanika ĝardeno , per buso		8	8
D1: Duontaga ekskurso: Zafarraya , kun faka vizito		15	15
D2: Duontaga ekskurso: Antequera		12	12
T1: Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): Ronda (*)		25	25
T2: Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): Kordovo (*)		30	30
T3: Tuttaga ekskurso, kun tagmanĝo (pikniko): Granado (*)		42	42
Trankvilito laŭ elekto (minimumume unu nokto)			
Je alĝo devas pagi: kongreskotizon, ĉambroperadon kaj tranaktadon laŭ elekto por minimume unu nokto. (+50% postkongreso kaze de ĝia rezervoj)			
Signu la elektitajn servojn			
Pagita sumo :			
Restanta pago :			
		unulita	dulita
		255	225
Postkongreso: Norda Maroko			
Vendredo, 10.05		Malaga-Algeciras-Ceuta-Tetuan	
Sabato, 11.05		Tetuan-Asilah-Tanger-Tetuan	
Dimanĉo, 12.05		Tetuan-Chaouen-Ceuta-Malaga	

Ĉambro mendilo

Bonvolu skribi la nomojn de la kunloĝantojn, kaze de plurita ĉambro; se ne, vi pagos la prezon por unulita ĉambro. LKK ne okupiĝas pri serĉi kunloĝanton.

Mi loĝos kun: _____

La nombro de ĉambroj rezervitaj en la Dioceza Domo estas limigitaj, kaj post ĝia kompletigo ni ne povos akcepti pliajn mendojn.

Mi mendas la jenajn noktojn (bonvolu signi).

La prezoj estas en Eŭro, por unu nokto kaj unu persono.

Noktoj	01/02	02/03	03/04	04/05	05/06	06/07	07/08	08/09	09/10	10/11	11/12	12/13
Malago – La Casa Diocesana (Domo Dioceza)												
unulita ĉambro, kun matenmanĝo												34 €
unulita ĉambro, kun duona pensio												42 €
unulita ĉambro, kun kompleta pensio												53 €
1 lito en dulita ĉambro, kun matenmanĝo												28 €
1 lito en dulita ĉambro, kun duonpensio												38 €
1 lito en dulita ĉambro, kun kompleta pensio												47 €
Pagmanieroj:												
Internacia ĝiro en eŭro al: Asociación Andaluza de Esperanto												
Banko: BANKIA, C/Compositor Lehmborg Ruiz, 9; 29007 MALAGA-ESPAÑA												
IBAN: ES57 2038 9814 83 6000595212												
SWIFT/BIC: CAHMESMM												

Ĝeneralaj instrukcioj

- Sendu la pagon al la indikitaj banko-kontoj de la LKK. Oni traktos la aligon nur post alveno de la pago.
- Se vi pagas per alia persono, kiu nepre devas sendi apartan aligilon, menciuj precizajn informojn pri la koncerna persono: nomo, lando, kompleta adreso.
- Kongres-kotizo nenikaze estas repagebla.** La pagoj por la ceteraj servoj estas repageblaj post la depreno de 10% por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la malmendon ĝis la 31-a de marto antaŭ kongreso.
- Post la ricevo de la koncerna pago, LKK konfirmos per **Konfirmilo** la akcepton de ĉiu aligilo, per indiko de via kongresa numero kaj de ĉiuj antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj servoj.
- LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn pro alta inflacio aŭ se aliaj neantaŭvideblaj kondiĉoj postulos tion.

Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la ĝeneralaj instrukcioj presitaj en ĉi tiu aligilo kaj aparte deklaras, ke mi havas san- kaj akcident-asekuron por mia restadperiodo en Andaluzio, en Hispanio, dum la 71-a IFEF Kongreso kaj Postkongreso en Norda Maroko.

Mi konsentas (ne konsentas), ke mia retadreso estu skribita en la kongresa libro (forigu ne taŭgan).

Loko, dato:

Subskribo:

Ni lernu per enigmoj kaj humoraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										



JG

Pro akra disputo inter geedzoj, la edzo ne plu volas aŭdi eĉ unu vorton de la edzino. tiam li diras:

"se vi deziras ion sciigi al mi, tiam skribu ĝin sur papereto. Mi faros same!"

Iun vesperon la viro skribas jene: *"Morgaŭ matene mi rendezuos frue kun amikoj.. Veku min je la kvina..."*

Li lasas la skribaĵojn sur la noktotablo de la edzino... Kiam li subite vekigis jam estas la naŭa. Sur la apuda noktotablo troviĝas papereto kun jena skribo: *"Estas jam la kvina ... vekigu!"*

Juna patro plendas ĉe amike pri la ofta plorado de lia fileto.

"Kial vi ne konsilas al via edzino ion kanti ĉe la ploranta bebo?"

Efektive, ŝi ja provis, sed tiam plendis najbaroj, ke ili preferas aŭdi la plorojn de la bebo.

En la familio, oni interkonsentas pri la elekto de venonta loko de someraj ferioj.

La dek-sep-jara filo, kiu ĉefe silentis, diras:

"Mi preferus iri al loko, kie mi jam delonge ne estis.."
La patro tuj reagis, dirante: *"Jen tridek eŭroj.. prefere vi iru al frizisto"*

VERTIKALE

1. Stat' de homo, kiu kapablas uzi egale du idiomojn.
2. Internen. Okcidento.
3. Ŝtofa pec' antaŭ scenejo de teatro. Maldika plat' el metalo.
4. Datum'. Muz' de la komedio.
5. Ag' de aferoj, kiuj sin sekvas laŭvice.
6. Artikolo. Pecet'. INVERSE:digne.
7. Amanta kaj amata virin'. Interjekcio esprimanta doloron.
8. Regula intermita bru'. Rita vest' uzata por Diservo.
9. Erao. Moviĝe. Riri sen vokaloj!
10. Subŝovanta la littukon.

VERTIKALE

1. Geometria figur'.
2. Vicmontra numeralo. Maldoĉa.
3. Gracia. Orienta sankta bild'.
4. Pens'.
5. Treni, sen ordo! Nedifina pronomo.
6. Juna bovin'. Model'.
7. Interjekcio. Multe. Nandu'.
8. Loĝant' en norda insulo.
9. Loĝej' por ĉevalo. INV: Veturil'.
10. Parte ŝanĝi. Prepozicio.

Viro, ferianta ĉe la marbordo renkontas amikon..

"Sed, kio okazis al vi, kia bandaĝo sur via okulo?"

- Jes, juna virino ŝprucis al mia vizaĝo ian ŝmir-oleon...

- Ĉu hazarde?

- Ne vere.. tra la ŝlosil-truo de la banĉelo, kie ŝi senvestiĝis.."

Fiŝkaptisto malkovras ĉe riverbordo averto-tabulon kun dikaj literoj kun jena skribo:

"Ĉi-tie estas malpermesite fiŝkapti".

Sed sube troviĝas jena anonco.

"Post prezento de via legitimilo, vi profitos 10% da rabato je aĉeto de trutoj, karpoj, angiloj tre bonkvalitaj en nia fiŝvendejo, placo de la stacidomo".

Solvo de la KVE de La Informilo 182

HORIZONTALE: 1.ŜIPESTR. 2.AKILO. ARO. 3. PULOVER. 4.REMIZI. 5.TINO. 6.KRAN. NEAD. 7.ĈAR. KLE. 8.ERODIO. IN. 9.LO. OBJEKT.

VERTIKALE: 1.CAR. AKCEL. 2.UK. RO. 3.ŜIPETAĈO. 4.ILUMINADO. 5.POLIN. RIB. 6.OZON. OJ. 7.SAVI. EK. 8.TRE. KALIK. 9.RORI. DENT.

Ni konatiĝu kun Feliĉa el Koreio, ŝi partoprenis ILEI-kongreson kaj UK-on. Ŝi estas artistino pri muziko kaj poezio. Ankaŭ ŝia filo partoprenis en koncerto "Maju"

Jen ŝi proponas al ni du poemojn tradukitajn el la korea.



Jen invito al vojaĝon, al la maro.

Feliĉa el Koreio montras al ni, per tiu poemo la emocion kiam subiras la suno ĉe la horizonto.

Poste pri ŝia espero malgraŭ la tempo, kiu kuras

La suno volas subiri la maron.

*Al la jam de antaŭe promesita loko
hastas la suno, fininte sian taglaboron
kaj fariĝinte bela per kosmetiko.*

Nun estas la eleganta kaj nobla vespero.

*Eĉ la vento blovas kun aromo,
kvazaŭ portante bukedon de floroj
ene de sia brusto.*

*Oni diras, ke tio estas kutima.
La suno subiras la maron simple.
Kaj ankaŭ mi pensis tiel.*

*Tamen nun mi rimarkis,
ke la suno revenis al la sama loko,
ĉar tie estas ĉiam sensanĝe
sopiro kaj amo al ĝi.*

Poezio

Mia espero.

*Tempo kuras kaj preterpasas min.
Senkompate malmultiĝas
mia tempo restanta.*

*Tamen mi ne malesperiĝas.
Ĉar mi estas "Esperantisto"
kiu batalas kontraŭ malfaciloj
ĉiam kun "Espero"*

*Mia espero estas jena.
Pro tempopaso
mi ne perdu spiriton por emociiĝi
pri ĉio bela, eleganta, nobla, kaj
romantika.*

*Pro tempopaso
mi ne perdu koron por kortuŝiĝi
pri varma amikeco kaj forta solidareco
kun la amikoj.*

*Pro tempopaso
mi ne perdu forton por viziti
la celitan lokon per propraj piedoj.*

*Kaj pro tempopaso
mi ne perdu entuziasmon
fajrigi la flamon de amo.*

En la numero 180 de la Informilo aperis raporto de ĉina delegacio, kiu vizitis Pollandon kaj pri la ceremonio TEO kaj AMO.

Ankaŭ aperis libro pri tiu evento kun 312 paĝoj. Ĝi estas mendebla ĉe nia kasisto je **15 eŭroj + 3 eŭroj da sendkostoj.**

La libro estos sendita al via adreso rekte el Pekino Ĉinio.



La libro estas dividita en kvar partoj. La unua, Teo kaj Amo, prezentas teon kaj la projekton "Teo kaj Amo" per interesaj rakontoj kiuj klarigas interalie pri la ĉina ideografiaĵo 茶 (pinyin cha, esperante teo), la ĉina te-etiketo, Teo kaj Amo

kaj prezentas tagnotojn de alilandaj partoprenantoj de la unua filmofestivalo "Teo kaj Amo", okazinta en 2015.

La dua parto, titolita Urboj de "Teo kaj Amo", prezentas la urbojn Hangzhou, Jingning kaj Dushan, en Ĉinio, Visaginas en Litovio, Nový Jičín kaj Svitavy en Ĉeĥio, kaj Bjalistoko kaj Bielsko-Biała en Pollando.

En la tria parto, Anĝeloj de "Teo kaj Amo", partoprenintoj de la filmokonkurso "Teo kaj Amo" rakontas pri siaj spertoj aŭ prezentas la tekston de siaj filmetoj. En tiu parto ankaŭ troviĝas intervjuo de Ĝoja al revuo Kontakto 274 (2016:4) tekstoj de kantoj uzitaj en muzikfilmoj faritaj por la filmokonkurso. Artikolo de LEE Jungkee, estrarano de UEA kaj membro de la ĵurio de la konkurso "Teo kaj Amo", enkondukas tiun ĉi parton de la libro kaj prezentas la gravecon de tiu konkurso.

La lasta parto de la libro, Vortoj de "Teo kaj Amo", prezentas fotojn kaj subskribojn de kunlaborantoj el pluraj landoj. Apud ĉiu foto legeblas la frazoj "Teo kaj Amo", "Ĉu vi trinkis teon hodiaŭ?" kaj "La mondo pleniĝu de tea aromo!" en la denaska lingvo de la persono, kiu ankaŭ kontribuis per frazo, legebla en la denaska lingvo kaj ankaŭ en Esperanto.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2019 ĝIS 2021

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2018 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2019.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2018, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2019	2020	2021	
		Abono por la papera versio:	17 eŭroj	17 eŭroj	17 eŭroj	
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj	
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj	
UEA	MG	<ul style="list-style-type: none"> • Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado. • Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 34 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago). • Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto 				11 eŭroj
	MJ(-T)					26 eŭroj
	MA(-T)					64 eŭroj
Pag-manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2019 por 1208					
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2019, 2020					
	3. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)					

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

"De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 12 + 2,80 = 14,80 eŭroj

Momerige al Roger Imbert (1938—2009)

Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio) sed eminenta esperantisto en Zagrebo (<kroatio) 4+1,50=5,50 eŭroj

Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

Knabaj petolaĵoj Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

La harplektaĵo de Sylvie Reff Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 5,80 = 17,80 eŭroj

Poŝamiko Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn

ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. 5,10 + 1,50 = 6,60 eŭroj

La 85-a Itala Kongreso de Esperanto en San Marino 18a - 25a aŭgusto 2018

Ĉi-foje la Itala Kongreso okazis ekster Italio, sed ĉirkaŭata de la teritorio de Italio en unu el la plej malnovaj ekzistantaj respublikoj de la mondo en San Marino, kiu troviĝas tute proksime al la konata riviero *Rimini*. Ĝi estis fondita jam en la jaro 301. Sur la kresto de la monto Titano leviĝas la tri fortikaĵoj videblaj jam de malproksime. Ni estis bonŝancaj kongresi en ĝia ĉefurbo San Marino. La kongreso fariĝis eksterordinara pro bonaj rilatoj kaj helpemo de la estroj de la Respubliko. La evento okazis en la prestiĝa kongresa centro *Kursaal*. Aliĝis 183 kongresanoj el 29 landoj, tamen kelkaj ne povis veni pro diversaj kialoj.

Sabate la 18-an de aŭgusto, post la alveno de la partoprenantoj, okazis Interkona vespero kun muziko kaj orientaj dancoj kaj la prezento de la dumsemajnaj ekskursoj fare de Paola Nigrelli.

La dimanĉan solenan inaŭguron prezidis Michela Lipari prezentante podianojn, inter kiuj ĉeestis gravaj gastoj. S-ino Fausta Morganti la eksa ministrino pri kulturo de San Marino kaj la dumviva reprezentanto de San Marino ĉe OSCE (Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo) en Vieno. Bonvenigis nin ankaŭ la itala ambasadoro en San Marino s-ro Guido Cerboni. Poste Javier Alcalde prezentis la kongresan temon "Malgrandaj komunumoj, grandaj valoroj". (Dum la semajno okazis seminario pri tiu temo kun viglaj diskutoj). Sekvis bonvenigaj vortoj kaj salutoj de kelkaj aliaj Esperanto-organizaĵoj (Junularo, KELI, ILEI, IFEF, LIBE), kaj po unu saluto el ĉiu kontinento. Poste la kursgvidantoj invitis la ĉeestantojn al siaj respektivaj Esperanto-kursoj. Amri Wandel prezentis la 35-an Sanmarinecan Universitatan Sesion (SUS 35) de AIS (Akademio Internacia de Sciencoj) fondita ĝuste en San Marino. Temis pri prelegoj: "Vivo ekster-tera" prezentata de Amri mem, "Shakespeare kaj Hamlet" prezentata de Humphrey Tonkin, "Ĝenerala lingvistiko" prezentata de David Astori kaj "Bioenergetiko de la homa organismo" prezentata de Eva Boyadjieva.

En la enirhalo estis instalita ekspozicio pri Marina Michelotti, kiu en San Marino, fondis grupon kaj multe laboris por Esperanto. Alia ekspozicio pri Esperanto kaj pri la aŭtoro de la lingvo L.L. Zamenhof troviĝis en la unua etaĝo. Enhavoriĉa estis la libroservo, kie okazadis libroprezentadoj de diversaj aŭtoroj: Michela Lipari, Carlo Minnaja, Paola Tosato, Humphrey Tonkin. Al interesatoj pri filatelio estis proponata poŝta stampo kaj poŝtkartoj de San Marino jam pretaj por forsendo.

Inter interesaj prelegoj estis tiu pri "Aliaj planlingvoj kaj aliaj grandaj valoroj", "Unu lingvo por ĉiuj, al ĉiu la propra lingvo", "Bona Espero en Brazilo",

"Religiaj objektoj de naciaj minoritatoj en Bosnio kaj Hercegovino" "La fundamento de novbabelismo", "Enigmoj en Esperanto", "Rolo de Esperanto dum la hispana civila milito".

Kadre de la kongreso kunvenis la itala sekcio de ILEI, Asembleo de la itala instituto de Esperanto kaj ankaŭ gejunuloj havis sian propran programon plejparte vesperan kaj amuzan.

Vendrede Elda Doerfer kun Michela Lipari prezentis la venontjaran Italan Kongreson, kiu okazos en la urbo Triesto de la 24-a de aŭgusto ĝis la 31-a aŭgusto. Do, vi ĉiuj estas bonvenaj. Poste okazis resumo de la laboroj de la seminarioj, de AIS kaj de E-kursoj.

Neforgesebla travivaĵo estis invito al la itala ambasadejo, kie ni aŭskultis en belega ĝardeno klasikmuzikan koncerton de fluta kvaropo *Renaissance* kaj poste ni estis invititaj al festeno kun ŝaŭmvino, fruktoj kaj glaciaĵo.

Tre alloga estis la oferto de ekskursoj. La partoprenantoj povis ekkoni la urbon San Marino, ties unuan turon kaj promeni en pitoreskaj stratoj. En aliaj ekskursoj oni povis vidi la tutan Italion en miniaturoj, viziti urbojn *Rimini*, *Santarcangelo di Romagna*, *San Leo*, *Cesena kaj Cervia*, *Urbino kaj Gradara*, *Ravenna*.

Tre interesa estis la Internacia muzeo pri ceramikaĵoj en *Faenza*, kie ni povis mem krei originalan vazon. En la muzeo de metiejoj ni ekkonis la historion de San Marino kaj la tiaman kamparanan vivon. Poste ni spertiĝis en preparado kaj bakado de speciala plata pano.


Dum vesperaj programoj regalis nin per muziko JoMo en publika parko, poste sekvis trinkmanĝa nokto. En aliaj vesperoj tie prezentiĝis italaj kantistinoj Grazia Barboni kaj Chiara Raggi, kiuj ricevis merititan aplaŭdon. En la salono de *Grand Hotel* Mario Migliucci prezentis teatran spektaklon "Unua rigardo". La lastan vesperon tie prezentiĝis la duopo *Evocaré* - Patrizia Bossoni, kiu recitis poemojn en Esperanto kaj Giuseppe Serafino akompanis ŝin per piano. Ĉe la fino oni premiis fotojn el la fotokonkurso lanĉita de la gejunuloj. Tiel finiĝis la 85-a Itala Kongreso de Esperanto.

La ĉi-jara kongreso estis vere elstara kaj bonege organizita. Riĉa propono de altkvalitaj prelegoj, en kiu ĉiu povis elekti ion interesan por sia gusto, laŭ la titolo de la prelego aŭ laŭ la preleganto.

Dankegon al la organizintoj de la Itala Esperanto-Federacio, kiuj sub la gvido de Michela Lipari preparis neforgeseblan kulturan kaj turisman programon dum tiu ĉi memorinda kongreso.

Liba Gabalda

85a staĝo "Printempa Renkontiĝo" en Strasburgo



okazos la 10 / 11 / 12-ajn de majo 2019


En la Kultur-centro:

Centre Culturel Saint Thomas

2 Rue de la Carpe Haute

67000 STRASBOURG

organizita de la Esperanto-grupo de Strasburgo



Programoj kaj aliĝilo aperos en la venonta numero de La Informilo, kaj intertempe en nia retejo esperanto.france.est.free.fr. Vi estos ankaŭ informita pere de niaj dissendolistoj.



Deĵorado en Fonfenoy-la-Joûte



Merkrede la 15-an de aŭgusto: jam matene, je la sepa horo Jacques HERLÉ alvenis por munti sian prezentadan tendon en la Vilaĝo de la Libroj, Fonfenoy-la-Joûte, apud Baccarat. Helpis surloke pluraj samideanoj el Loreno kaj Alzaco. Kuraĝiga estis la veno de sufiĉe multnombra scivolema publiko, tiel ke la belvetera tago rapide pasis. Ĉu baldaŭ novaj gelearnantoj???

Bernard ĉe UK en Lisbono

Dum la Kongreso en Lisbono mi aĉetis la libron de Carlo Minnaja : Historio de la Akademio de Esperanto. Mi ĵus finis legi ĝin. Grava kaj interesege verko, kiu bonege kaj fine, post longa atendo, plenigas en la movado veran mankon ĝis nun. Elstara verko. Mi dankas kaj gratulas la aŭtoron : Carlo Minnaja.



La 103a UNIVERSALA KONGRESO en LISBONO de la 28a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 2018



Unuafoje la Universala Kongreso okazis en Portugalio, en ties ĉefurbo Lisbono. Al la ĉi-jara evento aliĝis 2 562 geesperantistoj el 75 landoj. Ne eblis pretervidi grandegan emblemon sur la muro de la rektorejo.

Diversaj programeroj okazis en tri malsamaj lokoj. La ĉefa kongresejo estis en la fakultato pri juro de la



La Movado Foiro okazis en tro malvasta loko, tial svarmis la vizitantoj inter la multnombraj budoj.

lisbona universitato. En la rektorejo situanta en proksimego (trans la strato) okazis artaj aranĝoj kaj solena fermo de la kongreso.

La inaŭguro kaj la nacia vespero okazis en la salono de koncertoj proksime al la antikva urbocentro je distanco de 4 km for de la kongresejo. Temas pri teatro fondita en la jaro 1890. La inaŭguron ĉeestis ambasadoroj el Litovio, Pollando kaj Slovakio. Krom kutimaj bonvenigaj salutvortoj de la prezidanto Mark Fettes, de unuopaj landaj reprezentantoj kaj de aliaj gastoj, estis legita salutmesaĝo de Audrey Azoulay, ĝenerala direktorino de Unesko. Festparolis ankaŭ la pranepino de L.L. Zamenhof s-ino Margareta Zaleski Zamenhof. La bankedo kaj la balo okazis en la kultura centro de la kvartalo Belém, 10 km for de la kongresejo.

Post la alveno de la kongresanoj, la sabata vespero estis dediĉita al la Movada Foiro, kie diversaj Esperanto-asocioj povis ekspozicii siajn objektojn kaj varbi al siaj renkontiĝoj kaj aliaj aktivaĵoj. Ĉi-foje la loko ne estis tre taŭga por tiu celo. Malmulte da spaco kaj varmegeco en la halo ne faciligis kontakton kun la ekspoziciantoj.



La kongresa temo estis "Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun? Kiel kutime, la kongresaj



programeroj estis superŝarĝitaj je diversaj prelegoj, diskutoj kaj ne eblas en unu paĝo priskribi ĉiujn. Komitatkunsidoj, forumoj, akademio de Esperanto, diskutoj pri la kongresa temo, fakaj kunsidoj, belartaj konkursoj, aŭtoraj duonhoraj, junulara konkurso pri publika parolado, libroj de la jaro, legantoj de Esperanto, CO respondas, paroligaj lecionoj, KER-ekzamenoj, prezento de diversaj movadoj, aŭkcio kaj artaj aranĝoj estas nepraj dumkongresaj programeroj. Al tio aldoniĝis multaj aliaj interesaj prelegoj kaj atelieroj. Okazis prelegoj pri Portugalio, pri botanikaj specioj,

pri mitaj historioj, pri renovigebla energio, pri lisbonaj tramoj, pri malsameco de la lingvo en Brazilo kaj en Portugalio, eblis sekvi portugalan lingvokurson. Oni parolis pri perspektivoj por la Eŭropa Unio, pri sukcesoj kaj



Okaze de nacia vespero diversaj grupoj prezenti sian fado-dancadon



perspektivoj en planedo-scienca. La kongresa kuriero TAĴO NIA informis pri ĉiutagaj okazaĵoj.

Riĉa estis la propono al diversaj ekskursoj. Okazis antaŭkongresaj kaj postkongresaj ekskursoj. Tiamaniere esperantistoj povis ekkoni plurajn urbojn kaj belajn lokojn en Portugalio. La vojo de Lisbono al Porto estis parfumita per eŭkaliptaj arbaroj.

Ĉiutagaj ekskursoj ebligis promenadon en la urbo. Esperantistoj videbligis sin per kongressakoj.

La plej ŝatata merkreda ekskurso direktiĝis al *Sintra*. La oferto de UEA estis rapide elĉerpita. Tamen al tiu loko alvenis pluraj individuaj grupetoj aŭ soluloj. *Sintra* situas proksime al Lisbono en la nacia parko *Serra de Sintra*. Tie en verdaj montetoj aperas pluraj vidindaj kasteloj kaj palacoj kun eksterordinara arkitekturo kaj belegaj ĝardenoj.

Granda plezuro kaj neforgesebla sperto por kelkaj partoprenantoj estis flugado per balono. Por tio necesis vekigi



Ponto de la 25a de aprilo al Azeitão en Arrábida-montareto





Monumento proksime de la centro Belem al Vasco de Gama

La tuttaga ekskurso E4 proponis viziton al azulejo-fabriko. Temas pri specifa portugalaj kaĥeloj mane desegnitaj. La partoprenantoj povis ankaŭ mem pentri sian propran azulejon. Poste okazis vizito al vino-kelejo kun gustumado de vinoj.

frumatene. Apezata estis tre malmulte kosta manĝaĵo en la universitata restoracio kun afabla servistaro. Varmis en Lisbono kaj la temperaturo tiutempe altiĝis ĝis pli ol 40 gradoj en la tuta

iberia duoninsulo. Ne mirinde, ke la esperantista piedpilk-teamo malgajnis kontraŭ spertaj lokuloj je 1: 7.

Dum la kunveno pri venontaj kongresoj prezentiĝis Lahtio (Finnlando) por la jaro 2019 kaj Montrealo (Kanado) por la jaro 2020. Kutimaj klerigaj lundaj programeroj pro intereso rapide plenigis la koncernatajn salonojn. Dum la tuta kongresdaŭro ni kleriĝis en prelegoj de IKU, ISAE, AIS kaj aliaj. Malfacila estis la elekto inter tiom da programeroj.



Ĉi-jara UK estis riĉa kaj varia laŭprograme, ĉiu povis trovi por si ion interesan. Okazis diversaj fakaj kunsidoj kaj allogaj prezentadoj, ekspozicioj, muzikaj posttagmezoj, spontanea gitarludado kaj kantado en la koridoro kaj vesperaj koncertoj kun famkonataj esperantisto-artistoj. Ĉe la fino la infanoj de la kongreseto venis saluti nin.

Unuvorte, la kongreso estis ĝuinda kaj necesas danki al la organizantoj kaj al iliaj kunhelpantoj pro ĝia sukceso.

Liba Gabalda



Ĉu Esperanto en Norda Koreio???

Okaze de ILEI-kongreso en Madrido s-ro Wei el Ĉinio raportis pri ĉina delegacio, kiu vizitis 2-foje Nordan Koreion kun la celo instrui Esperanton. Dank'al s-ro Zhang Wei ili sukcesis kontakti kun nordkoreaj ĉiĉeronoj, kiuj akceptis lerni la lingvon. Jen ni konatiĝu kun la grupo kaj ilia sukceso. La Esperanto-karavano al Norda Koreio estis organizita de IKEF-Ĉinio. Jen Ombro intervjuas s-inon Neĝeta. Vi memoru, ke en Azio la homoj alprenas al si kromnomon en Esperanto.

Andreo

S-ro Wei skribis: Oni ofte demandas, ĉu en Norda Koreio troviĝas Esperantistoj aŭ esperantaj agadoj.

En aprilo 2017 tri francaj esperantistoj vizitis Nordan Koreion por serĉi esperantistojn. Ili provis sed vane. Post kiam ili vizitis mian urbon Dandong, ili raportis pri tio. Ni decidis elekti alian vojon, instrui Esperanton al ĉiĉeronoj en Norda Koreio.

Mi havis bonan rilaton kun iu turisma agentejo en tiu lando. Ili akceptis mian proponon kaj disponigis kvar ĉiĉeronojn.

Nia unua karavano de Esperanto al Norda Koreio vojaĝis de la 4a ĝis la 7a de junio 2018, ĝi konsistis el 18 personoj, inter kiuj estis 10 esperantistoj.



S-ino Neĝeta (Shi Xue-Qin) instruistino en Elementa Lernejo en Ĉinio

Kio estas en la fermita fenestro?

Okaze de la unua Esperanto-vojaĝo al Norda Koreio, en Junio, 2018.

Intervjuo Kun s-ino Neĝeta pri la vizito al Norda Koreio, kiu okazis en la komenco de Julio, organizita de s-ro Zhang Wei.

(La intervjuo estis farita en la 20an de Junio, per tujmesaĝilo.)

Demando(Ombro): Kio estas via impresoj, post la vojaĝo al Norda Koreio?

Saluton, Ombro, Hodiaŭ mi havis ekskurson kaj nun, nur nun mi estas libera, Do, estas malfacile verki ion por vi. Do, laŭ via propono per mesaĝeto, mi ion rakontos al vi pri mia vizito al Norda Koreio. Ĉu bone? Mi pensas, ke, kiam mi parolas, tiam la vortoj povus esti senordaj, do, se vi volas verki ion, aŭ aperigi iun informon en gazeto, aŭ doni informon al aliaj, tiam vi devas bone ordigi miajn vortojn. Dankon!

Do, unue, mi volas diri la impreson pri la lando: Fakte antaŭ la vojaĝo, mi jam aŭdis pri la lando, ĉar por mi, la lando estas tre mistera, pro tio, ke ĝi delonge estas fermita. Kiam la trajno, nia trajno atingis la landon, ni ĉiuj kun grandaj malfermitaj okuloj rigardis ĉion tra la vagona fenestro.

En kamparo oni jam semas rizon. Oni grupe laboras. La rizkampoj estas tre vastaj. De tempo al tempo oni povas vidi kaj vilaĝojn kaj vilaĝanojn.

La domoj preskaŭ estas tute samaj kaj je formo kaj je koloro. La loĝejoj ne estas tiom modernaj kiel la ĉinaj kamparaj kunetaĝaj domoj. Ŝajne la vilaĝoj estas tre kvietaj kaj bone aranĝitaj.

Monda premiero: ĉina delegacio instruas Esperanton en Norda Koreio al oficialaj ĉiĉeronoj!!!

Kiam la trajno proksimiĝis al la ĉefurbo, oni povis vidi la domojn kun koloroj kaj kun etaĝoj. La ĉefurbo estas moderna. Ambaŭflanke de la strato estas domegoj. La stratoj estas tre puraj. Ne estas multaj aŭtomobiloj.

Ĉiĉerono diras, ke en la lando ne ekzistas privataj aŭtomobiloj, ĉiuj aŭtomobiloj apartenas aŭ al kompanio aŭ al la ŝtato, ktp..

Ĉe la domegoj oni povas vidi florojn en vazoj ĉe balkonoj kaj fenestroj. Krom tio nenion oni povas vidi. Ankaŭ tiu fenomeno vokas mian scivolemon. Kio estas malantaŭ la fermitaj fenestroj? En la urbo, ne mankas arboj. Sed malofte videblas floroj. (Tiam estis la komenco de Julio) Eble nur mi rimarkis tion, ĉar mi estas floro-ŝatanto. Tra



Esperanto-kurso en Pyeongyang

fenestro de la buso, oni povas vidi piedirantojn. Plejparto de virinoj vestas sin elegante per profesia kostumo.

La ĉiĉeronoj tre amas sian landon, kaj tre amas siajn eksajn kaj nunan prezidentojn ege, ege. Mi rakontu al vi iun fenomenon. Do, en la aŭtobuso tra la fenestro, ni povis vidi geknabojn, kiuj preterpaŝis la fotojn de tiuj prezidentoj kaj ili mem vole salutis per klinitaj kapoj antaŭ la fotoj.

D: Kia estis via Esperanto-instruado dum la vojaĝo?

R: Pri Esperanto-instruado. Dank'al klopodo de s-ro Zhang Wei, la vojaĝ-agentejo sendis al ni kvar ĉiĉeronojn por instrui Esperanton, vespere dum nia vojaĝo. Ili nomiĝas Arbaro, Flora, Bela, kaj Juvela. Vi povas rimarki: Unu estas sinjoro, kaj aliaj estas virinoj. S-ro Li Wei-Lun, profesoro en Pekino, kunportis mem kompilitajn lernolibrojn, kaj paperojn kun utilaj ĉiutagaj vortoj por ĉiĉeronoj.



4 nord-koreaj ĉiĉeronoj kun prof. Li Wei-Lun, kaj Neĝeta

Vespere, ni kolektiĝis en la salono de la hotelo. Danke al ilia klereco kaj diligenteo, ili tre rapide lernis la prononcon de la alfabeto. Tuj post tio, ili literumis vortojn, legis frazojn kaj komprenis bazajn gramatikaĵojn per helpo de s-ro Li. Ili donis al mi grandan impreson jene:

Unue, la lernomaniero estas ne sama, kiel la ĝenerala kurso, ili scivoleme legis vortojn, kaj tekstojn. Nur kiam ili renkontis nekompreneblajn punktojn, ili faris demandojn. Due, iliaj prononcoj estis tre belaj kaj agrablaj. Trie, ili ĉiuj estas tre diligentaj kaj fervoraj por lerni Esperanton. Mi povas rimarki, ke ili havas grandan intereson lerni Esperanton. Kaj ili eĉ volis lerni novajn esprimo-manierojn por ĉiĉeronoj.

D: Kia estis loĝado dum la vojaĝo?

R: Pri la hotelo, mi ne havas ion por diri. Mi nur povas diri, ke la hotelo estas eble, relative relative luksa en la urbo. Estas pli ol 38 etaĝoj. Salono estas iom luksa. Do, mi povas sendi al vi fotojn pri la salono. Mi faris foton kun s-ro Li en la salono. Tamen en la ĉambro, loĝoĉambro, la aranĝoj kaj bezonaĵoj ne estas tiel bonaj kiel en ĉinaj hoteloj.

Pri la manĝo: Mi volas ion aldoni, ke en Norda Koreio dum mia vojaĝo, mi tre bone manĝis kaj estis bone servita dum la manĝado. Antaŭe, antaŭ nia vojaĝo, mi aŭdis, ke en tiu lando mankas nutraĵoj por la popoloj. Sed, fakte, ni pli bone manĝis en Norda Koreio ol en Ĉinio dum la vojaĝo.

Speciala Raporto pri Norda Koreio

Jen pri la dua Esperanto-karavano al Norda Koreio. Vi povas mem legi ĝin. Ĉar oni skribis en la Ĉina kaj ankaŭ en Esperanto.

D: Ĉu vi sentas vin feliĉa kaj rikolto-riĉa je la vojaĝo?

R: Jes, mi estas feliĉa kaj tre ĝoja pri mia vojaĝo. Unue mi sukcesis instrui Esperanton en Norda Koreio. Tio estas granda paŝo. Eĉ en monda Esperanto-movado. Mi povas tiel diri. Due, ni bone manĝis kaj estis bone servitaj en la lando. Antaŭe mi aŭdis ion pri la lando. Sed ĉi-foje mi povis per propraj okuloj vidi ion, kaj per propraj oreloj aŭdi ion. Fakte, kelkaj aferoj ne estis samaj, kiel mi antaŭe aŭdis.



Ĉiĉerono foliumas la Esperanto-bildvortaron, verkitan de s-ro BAK Mi-Hong



Granda manĝo-salono en la 38-a etaĝa hotelo



Panmunjeom-turo, kie norkoreoj kaj sudkoreoj de tempo al tempo rajtas renkontiĝi

D: Ĉu ĉiĉeronoj lernis eksterlande, ekzemple en Ĉinio aŭ en Rusio?

R: Tion mi ne scias, ĉar ili ne diris tion. Ŝajne, laŭ iliaj vortoj, ili ne lernis en eksterlando. Tamen ili estis tre bone edukitaj. Ili, ŝajne, scias ĉion pri la mondo. Precipe pri politikaj aferoj ili pli multe scias ol mi. En Norda Koreio popolanoj ne povas uzi intereton, tamen ili havas sian landan reton. Oni povas facile uzi reton por uzi komputilon kaj poŝtelefonon. Mi ankoraŭ ne diris tion, kion ĉiĉeronoj diris al mi. Ankaŭ tio estas tre interesa. Per iliaj vortoj, oni povas kompreni kiamaniere oni vivas ĉiutage, pri loĝejo, pri eduka sistemo, pri sporto, pri ĉio, do, estas tre interese, kaj tute eĉ malsama en Ĉinio, kvankam Ĉinio estas ankaŭ socialisma lando. Mi tre ekŝatas ilian edukan sistemon.

D: Ĉu vi opinias, ke homoj en Norda Koreio havas saman korinklinon por la paco kaj por la feliĉo?

R: Bedaŭrinde mi ne povis havi ŝancon kontaktiĝi kun popolanoj. Tamen ili, laŭ la diro de ĉiĉeronoj, ili estas tre feliĉaj kaj ĉiuj esperas pacon kaj deziras unuiĝon de siaj landoj. Kaj ili tre alte taksas sian korean nacion. Ili pensas, ke, ĉu Norda Koreio, ĉu Suda Koreio, en ambaŭ landoj ĉiuj estas koreoj. Ili diris, ke koreoj konsistigas unu solan familion.

D: Ĉu la ĉiĉeronoj, havas edz(in) on?

R: Arbaro havas edzinon, sed aliaj estas ankoraŭ fraŭlinoj.

Tamen Flora diris, ke ŝi nun estas 25 jaraĝa, do, antaŭ ol iĝi 27-jaraĝa ŝi planas edziniĝi, kaj volas havi tri infanojn.

D: Ĉu ili ŝatas fotadon aŭ esti fotitaj?

R: Jes, ili estas tre afablaj. Do, ĉiam, kiam oni volis fotiĝi kun ili, ili agrable fotiĝis kun aliaj.

D: Se vi havus alian ŝancon refoje viziti Nordan Koreion, ĉu vi iros aŭ ne plu iros?

R: Mi jam promesis reiri al Norda Koreio.



Neĝeta kun novebakitoj-ĉiĉeronoj

Dankon al s-ro Wei, kiu permesis aperigi tiun artikolon



Difino de 'komunikado'

